

Johann Wolfgang von Goethe,
Kiam mont' kaj val' matene

tradukita de Manfredo Ratislavo

Kiam mont' kaj val' matene
De nebul' malvualigas,
Kaj la florkalikoj plene
Per koloroj ornamigas;

Kiam la eter', portanta
Nubojn, kun la tag' kverelas,
Kaj sunvojon preparanta
Vento tiujn ĉi forpelas;

Se vi, tion rigardante,
Pensas pri la Sun' sincere,
La ĉielon origante
Malleviĝos ĝi vespere.

*Traduko de la Germana poemo "Früh, wenn Tal, Gebirg und Garten" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2000-05.*

Arg-110-221 (2003-12-30 21:20:39)